# BULTENO
## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

**N-ro 25** **Februaro** **1927**

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al « ESPERANTO » ★ Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENEVE

TEKSTO: Deka kunsido de la Konferenco. — Pliiĝanta laboro de la Internacia Laboroficejo. — Belgujo konfirmas 5 konvenciojn. — Svislando konfirmis konvencion pri kompenso pro profesiaj malsanoj. — Hindujo konfirmis 2 konvenciojn. — Hindujo konfirmos konvencion pri inspekto de elmigrantoj surŝipe. — Irlando konfirmas konvencion pri kompenso pro profesiaj malsanoj. — Vicdirektoro vizitas Sudafrikon. — Subkomitato pri sendaĝereco. — Germanujo kaj konvencio pri Patrineco. — Studo pri libera sindikatiĝo. — Loĝeja problemo. — Mono kaj senlaboreco. — Progresoj de Okhora tago. — Industrio, produkto kaj kostoj en Ruslando. — Graveco de perdoj pro laborakcidentoj. — Efiko sur produktado de Okhora leĝo en Francujo.

### La Deka Kunsido de la Konferenco.

La Deka Kunsido, kiu malfermiĝis la 25-an de Majo 1927, kaj pri kies komencaj diskutoj mallonga raporto jam aperis en la Bulteno N-ro 23, daŭrigis ĝiajn kunvenojn ĝis la 16-a de Junio. Diversaj kaŭzoj ĝis nun malebligis nin raporti pri la pluaj diskutadoj, sed ni opinias, ke la bulteno nepre devas sciigi, eĉ malfrue, la finajn decidojn de tiu kunsido.

Oni memoros, ke la tagordo enhavis tri demandojn: asekuro kontraŭ malsano, metodoj por starigi minimumajn salajrojn kaj libereco por sindikatiĝi, kaj ke al la du lastaj estus aplikota la nova proceduro per « duobla diskutado ». Do, la Konferenco devis, pri tiuj demandoj, decidi la grandajn liniojn de eventuala internacia arango kaj la punktojn, pri kiuj la Registaroj devus esti konsultataj per demandaro.

Pri la *metodoj por starigi minimumajn salajrojn*, la Konferenco akceptis, per 80 voĉoj kontraŭ 19, projekton de demandaro kaj decidis, per 89 voĉoj kontraŭ 22, ke la demando estu metata en la tagordon de la Dekunua Kunsido kunvenonta en 1928.

Pri la alia demando: *libereco por sindikatiĝi*, la Konferenco mal akceptis, per 54 voĉoj kontraŭ 42, la proponitan projekton de demandaro, kaj, ĉar oni ne povis konsenti pri teksto, oni decidis, per 66 voĉoj kontraŭ 28, ke la demando ne estu metata en tagordon de la sekvonta kunsido. Kaŭze de tiu malfacilaĵo, la Konferenco unanime petis la Administran Konsilantaron, ke ĝi plie ekzamenu la proceduron pri duobla diskutado kaj prezentu proponojn por ĝia plibonigo ĉe la sekvonta kunsido de la Konferenco.

Pri la demando: *Asekuro kontraŭ malsano*, la Konferenco akceptis, ĉe fina voĉdonado, per 97 voĉoj kontraŭ 9, Projekton de Konvencio pri Asekuro kontraŭ malsano por laboristoj en industrio kaj komerco kaj por domservistoj.

Ĉe fina voĉdono, ĝi ankaŭ akceptis, per 85 voĉoj kontraŭ 9, Projekton de Konvencio pri Asekuro kontraŭ malsano por agrikulturaj laboristoj.

La Konferenco ankaŭ akceptis, ĉe fina voĉdono, per 99 voĉoj kontraŭ 0 rekomendon pri la ĝeneralaj principoj de socia asekuro.

Per 79 voĉoj kontraŭ 0, la Konferenco akceptis rezolucion ebligantan enketon pri metodoj por venki la malhelpaĵojn kontraŭ asekuro en maldense loĝataj landoj.

### La ĉiam pliiĝanta scienca laboro de la Internacia Laboroficejo.

La progreso pri konfirmo de konvencioj, la efektiviĝo de gravaj reformoj en diversaj landoj, montras la agadon de la Internacia Labora Organizaĵo pri socia leĝdonado. Estas eble pli malfacile imagi, eĉ proksimume, la sciencan agadon de la Internacia Laboroficejo, agadon dediĉitan al esploro kaj dokumentado. Ĉi tie tamen fariĝas laboro vastega kaj ĉiam kreskanta.

Unu ekzemplo povas doni ideon pri tiu konstanta kreskado. La « Leĝdona Serio », en kiu la Oficejo eldonas tekstojn kaj tradukojn de leĝoj pri laboro en ĉiuj landoj, havis en sia volumo por 1922, 1,150 paĝojn, en 1923, 1,700 paĝojn. En 1924, ĝi havis pli ol 2,000 paĝojn, kaj ĝia amplekso ankoraŭ pliiĝis en 1925 kaj 1926. Tio atestas la aktivecon samtempe de la naciaj leĝdonantaroj kaj de la Internacia Laboroficejo.

Krom la kolekto de laborleĝoj, la Oficejo eldonas en sia « Internacia Kolekto de Juĝaj Decidoj pri Laboro », la decidojn solvintajn aŭ celintajn solvi gravajn jurajn demandojn. Ĝi faras ankaŭ kolekton de kolektivaj kontraktoj inter mastraj kaj laboristaj organizaĵoj por starigi laborkondiĉojn. Responde al multaj petoj de transoceanaj landoj, ĝi preparas, en hispana lingvo, kolekton de laborleĝaro en la Ŝtatoj de Latina Ameriko, kiu por multaj Europanoj estos vera revelacio. Ĝi estas ankaŭ eldonanta, en definitiva formo, naciajn monografiojn pri libereco por sindikatiĝi.

La enketo pri la karbominejoj, kiu renkontis tiom da malfacilaĵoj estos baldaŭ finita. Ĝi rezultigis kolekton de ampleksa dokumentaro pri salajroj kaj laborhoroj en la minejoj de la ĉefaj karboproduktantaj landoj.

La Oficejo faras periodan enketon en kreskanta nombro da landoj, pri la nivelo de la « realaj salajroj », tio estas la efektiva valoro de la salajroj, valoro, konata per komparo de la monaj salajroj kun la prezoj. Ĝi daŭrigas la dokumentadon pri metodoj por fiksi minimumajn salajrojn, kiel preparadon por la Konferenco en 1928.

Aliaj studoj farataj koncernas la komparon de diversaj leĝoj pri laborhoroj, la feriojn kun pago de salajroj, la laborhorojn de oficistoj kaj komizoj kaj la rilatan temon pri la horoj por malfermo kaj fermo de magazenoj kaj butikoj, la laborhorojn de fervojistoj kaj motoristoj, la leĝojn pri la laboro de virinoj antaŭ kaj post akuŝo kaj la laboron de infanoj pri la produktado de kinematografaj filmoj.

La verko eldonita antaŭ tri jaroj pri la Problemo de loĝigo en Eŭropo estas elĉerpita en la franca kaj germana tekstoj. La Oficejo preparas novan eldonon, multe modifitan kaj pligrandigitan. Krom tio, laŭ propono de la Internacia Unuiĝo de Urboj, ĝi entreprenis la ekzamenon de la metodoj uzataj por la preparo de statistikoj pri loĝejoj, metodoj kies granda diverseco malfaciligas internacian komparadon.

La granda problemo pri profesia orientigo, tio estas, la esplorado de la rimedoj por eltrovi la naturajn kapablecojn de infanoj kaj gejunuloj, por direkti ilin al la profesioj al kiuj ili estas plej taŭgaj, kaj la funkcio de la kuracisto pri tiu orientigo, estas ankaŭ temoj de farataj studoj. Alia enketo rilatas la profesian edukadon aŭ reedukadon de kripluloj, neprogresintoj kaj nenormaluloj.

Ne estas necese ĉi tie aludi la diversajn studojn de la Oficejo por

la Ekonomia Konferenco kunveninta en 1927, nek la studojn pri senlaboreco kaj prezmovadoj, pri migrado, pri laborakcidentoj kaj profesiaj malsanoj, pri agrikultura laboro kaj multaj aliaj temoj, pri kiuj ni jam raportis de tempo al tempo en la Bulteno.

La preparado por la Marista Konferenco en 1929 necesigas enketojn pri la reguligo de laborhoroj surŝipe kaj pri la plibonigo de la kondiĉoj en kiuj la maristoj restadas en la havenoj. La Oficejo ankaŭ faras ĝeneralan studon de la laborkondiĉoj en la fiŝkaptado, studojn pri la dungokontraktoj de maristoj kaj fiŝkaptistoj, pri laborkondiĉoj ĉe akiro de spongoj, perloj, koralo kaj aliaj submaraj produktaĵoj. Ĝi jam eldonis kolekton de leĝoj pri mara laboro kaj ĝi studas la rimedojn por la protekto de la maristoj okaze de malsano kaj akcidentoj. Laŭ demando de la Ligo de Nacioj, ĝi entreprenis enketon pri la laborkondiĉoj en la enlanda navigado.

Ampleksa raporto jam estas eldonita pri la deviga laboro de indiĝenoj; kontraktita laboro estas studata kaj enketo pri laborkondiĉoj en Aziaj landoj progresas regule.

La Servo kiu sin okupas pri laboro en Ruslando eldonis dum 1927 volumon pri la Sindikata Movado en Sovjeta Ruslando, kaj aliaj volumoj pri Kooperado en Ruslando kaj Sociaj Asekuroj en la URSS estas preparataj.

Aliaj studoj jam komencitaj aŭ baldaŭ komencotaj rilatas al la variado de salajroj dum la lastaj jaroj, la familiaj salairoj, la utiligo de la libertempo de laboristoj, la internaciaj statistikoj de la kooperativoj, la laborkondiĉoj de fremdaj laboristoj, la « sociaj ŝarĝoj » (tio estas, la kosto de la sociaj servoj starigitaj de laborleĝoj).

Ni povas plie aludi pri enketo pri la metodoj por venki la malfacilaĵojn kontraŭstarantajn la organizon de deviga malsanasekuro en landoj de maldensa loĝantaro aŭ kies geografiaj kondiĉoj malfaciligas komunikadon; studoj pri leĝoj rilataj al minimumaj salajroj en agrikulturo kaj pri diversaj maraj demandoj, ekzemple, la reguligo de la ŝarĝolinio, la reguligo de ŝarĝoj sur la ferdeko (escepte lignon), unuigo de statistikoj pri ŝippereoj kaj akcidentoj sur ŝipoj.

Fine la Oficejo pritraktos la grandan temon de la normigo de la industria higieno.

Evidente la Internacia Laboroficejo ĝis longa tempo ne suferos de senlaboreco.

---

## Belgujo konfirmas kvin internaciajn konvenciojn.

La Internacia Laboroficejo estas sciigita, ke la Belga Registaro konfirmis la jenajn kvin projektojn de konvencioj akceptitajn de la Internacia Labora Konferenco.

Projekto de Konvencio pri:

Kompenso pro laborakcidentoj;

Kompenso pro profesiaj malsanoj;

Egaleco de traktado por naciaj kaj eksterlandaj laboristoj pri kompenso pro akcidentoj;

Dungokontraktoj de maristoj;

Reenpatrujigo de maristoj.

---

## Svislando konfirmis la konvencion pri kompenso pro profesiaj malsanoj.

La Registaro de la Svisa Konfederacio anoncis al la Internacia Laboroficejo, ke ĝi jus registrigis ĉe la Sekretario Generala de la Ligo de Nacioj sian konfirmon de la konvencio pri kompenso pro profesiaj malsanoj.

Ĉi tiu konvencio estis akceptita de la Internacia Labora Konferenco en ĝia sepa kunsido, okazinta en Genève en 1925. Ĉiu Ŝtato konfirmanta la konvencion sin devigas asekuri al la viktimoj de profesiaj malsanoj aŭ iliaj postvivantaj dependuloj kompenson laŭ la ĝeneralaj principoj de la nacia leĝaro pri kompenso pro laborakcidentoj. Ĝi ankaŭ devigas nin konsideri kiel profesiajn malsanojn la malsanojn kaj venenadojn produktatajn de plombo, ĝiaj kunfandaĵoj aŭ kunmetitaĵoj, hidrargo, ĝiaj amalgamoj aŭ kunmetitaĵoj, kaj kar bunkola infekto, kiam tiuj malsanoj aŭ venenadoj trafas laboristojn apartenantajn al la industrioj aŭ profesioj rilatitaj al la respektivaj malsanoj aŭ venenadoj en la listo enhavita en la konvencio.

Tiu konvencio estis jam konfirmita de Belgujo, Finlando, Granda Britujo kaj Sudslavio.

---

## Hindujo konfirmis ankoraŭ du konvenciojn internaciajn.

La Internacia Laboroficejo jus estis sciigita, ke la Hinda Registrao konfirmis la Konvencion pri kompenso pro profesiaj malsanoj kaj la Konvencion pri egaleco de traktado de fremdaj kaj naciaj laboristoj pri kompenso pro laborakcidentoj.

Ĉi tiuj du konvencioj estis akceptitaj de la Internacia Labora Konference en ĝia kunsido en 1925.

Ĉiu Ŝtato konfirmanta la due nomitan konvencion sin devigas doni al la naciuloj de ĉiu alia Ŝtato ankaŭ konfirminte ĝin, kiuj fariĝas viktimoj de laborakcidentoj en sia teritorio, aŭ al iliaj postvivantaj dependuloj, la saman traktadon, kiuf ĝi donas al siaj propraj naciuloj rilate kompenson pro laborakcidentoj.

---

## Hindujo konfirmos la konvencion pri inspekto de elmigrantoj surŝipe.

La Registaro de Hindujo decidis, konsente kun la Parlamento, konfirmi la Projekton de Konvencio pri la inspekto de elmigrantoj surŝipe kaj efektivigi la Rekomendon pri la protekto de virinoj kaj knabinoj elmigrantaj surŝipe. Ambaŭ ĉi tiuj aranĝoj estis akceptitaj de la Internacia Labora Konferenco en ĝia Oka Kunsido en 1926.

Projekto de leĝo por modifi la Leĝon de 1922 pri Elmigrado estis prezentita al la Leĝdonanta Kunveno, en la cela akordigi la Hindan leĝaron kun la diritaj konvencio kaj rekomendo.

La Projekto de Konvencio pri Inspekto de elmigrantoj surŝipe estas jam konfirmita de Nederlando kaj Granda Britujo. La konfirmo de Granda Britujo tamen estos nur efika, kiam la Projekto de Konvencio estos ankaŭ konformita de Francujo, Germanujo, Italujo, Norvegujo kaj Hispanujo.

---

## Irlando konfirmas la konvencion pri kompenso pro profesiaj malsanoj.

La Registaro de la Irlanda Libera Ŝtato jus sciigis la Internacian Laboroficejon, ke ĝi konfirmis la projekton de konvencio pri kompenso pro profesiaj malsanoj, akceptitan de la Internacia Labora Konferenco en ĝia Sepa Kundiso (Genève, 1925).

La Libera Ŝtato ankaŭ akceptis la Rekomendon de la Konferenco pri la sama temo.

---

## Vizito de la Vicdirektoro al Sudafriko.

La Registaro de la Unuiĝo de Sudafriko invitis Sinjoron H. B. Butler, Vicdirectoron de la Internacia Laboroficejo, viziti Sudafrikon dum la nuna aŭtuno, kaj la Departemento pri Laboro aranĝis vastan vojaĝon, kiu kondukas lin en ĉiujn kvar Provincojn de la Unuiĝo. La Registaro de la Unuiĝo ĉiam montris vivan intereson pri la laboro de la Organizaĵo kaj estis bone reprezentata en ĉiu kunsido de la Konferenco. Krom tio, S-ro W. Gemmill, sekretario de la Ĉambro de Minejoj de la Transvaalo, estas unu el la delegitoj de la mastroj en la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo.

La precipa celo de la vizito de S-ro Butler estas, disvastigi tra la Unuiĝo pli grandan scion pri la Organizaĵo kaj ĝiaj principoj kaj agadoj. Li ankaŭ ĝuos okazon por viziti la ĉefajn minajn kaj indus-

triajn regionojn kaj lerni la kondiĉojn ekzistantajn ĉe la blankaj kaj koloritaj laboristoj en Sudafriko.

---

## La laboroj de la Subkomitato pri Sendanĝereco ĉe la Internacia Laboroficejo.

La Subkomitato pri Industria Sendanĝereco ĉe la Internacia Laboroficejo malfermis sian lasttempan kunsidon, sabaton la 5-an de Novembro. Siaj laboroj tre frape montris la gravecon de la problemo pri la antaŭforigo de laborakcidentoj, problemo kiu estos prezentata al la Konferenco en 1928. Oni citis impresajn ciferojn. En Usono 25,000 laboristoj estis mortigitaj per laborakcidentoj dum unu jaro. En la sama lando laborakcidentoj kostas 4 miliardojn da dolaroj ĉiujare kaj en Francujo 4 miliardojn da frankoj. Nu la sperto pruvas, ke, per la apliko de iuj protektaj rimedoj, tiuj malfacilaĵoj povus esti malpliigataj. En iuj speciale danĝeraj industrioj oni sukcesis malpliigi la nombron da akcidentoj je 60, 70 kaj eĉ 80 procentoj. Ĝi temas pri antaŭforiga organizo. Ĉar tiu organizo estas ebla, la spertuloj unuanime postulas, ke ĝi fariĝu deviga en ĉiuj landoj per leĝoj. Tiu principo devas esti la bazo de la internacia reguligo antaŭvidata.

La Subkomitato konsentis kun la raporto de la Internacia Laboroficejo, kiu proponis, ke la Internacia Labora Konferenco rekomendu: la devon por la entreprenistoj, ke ili submetu la planojn de iliaj konstruaĵoj al la laborinspektoroj; la intiman kunlaboron de la reprezentantoj de la Registaroj kun mastroj, laboristoj asekuro-kompanioj kaj aliaj, por disvolvigi la ĝeneralan instruadon pri antaŭforigo de akcidentoj, favori studojn pri profesia elekto (t. e. la elekto de personoj por profesioj kaj de profesoj per personoj) kaj pri statistikoj de akcidentoj, k.t.p.

La raporto de la Internacia Laboroficejo, kiun la subkomitato diskutis, aparte esploris iujn specialajn demandojn: la forigo de akcidentoj ĉe kunigo de veturiloj sur la fervojoj, demando kiu interesas publikan opinion, jam de multaj jaroj; la demando, proponita de la Germana Registaro, pri la markado de la pezo de pakoj transportataj surŝipe, kaj la demando, proponita de la Brita Registaro, pri la protekto de laboristoj okupataj pri la ŝarĝado kaj deŝarĝado de ŝipoj.

---

## Germanujo kaj la Konvencio pri Patrineco.

Dum la kunsido de la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo en Berlin, la reprezentanto de la Germana Registaro anoncis, ke lia Registaro konfirmis la Konvencion pri la laboro de virinoj antaŭ kaj post akuŝo. Tiu Projekto de Konvencio estis akceptita en la unua kunsido de la Internacia Labora Konferenco en Washington en 1919. Ĝi ordonas, ke en ĉiu industria aŭ komerca establaĵo privata aŭ publika aŭ en iu ĝia filio, kun escepto de establaĵoj kie nur membroj de la sama familio estas okupataj, ne estos permesate al virino labori dum la ses semajnoj sekvantaj ŝian akuŝon, ke ŝi havos la rajton lasi sian laboron se ŝi prezentas ateston de kuracisto ke ŝia akuŝo verŝajne okazos en la limtempo de ses samajnoj, kaj ke, dum ŝi forestos, ŝi ricevos kompenson sufiĉan por la plena kaj sana subteno de ŝi kaj ŝia infano, kune kun senpaga kuracado. Patrino mamnutranta sian infanon ankaŭ rajtos ĉiutagan libertempon por tiu celo.

Germanujo estas la unua el la ok plej gravaj industriaj Ŝtatoj konfirminta tiun konvencion. Tamen en iuj el tiuj landoj la proceduro por konfirmo jam komenciĝis. En Italujo, la konsento de la kompetenta aŭtoritato estis donita en 1922. En Belgujo kaj Francujo la Registaro rekomendis konfirmon. La Konvencio estis jam konfirmita de Bulgarujo, Ĉilo, Greklando, Hispanujo, Latvio, Rumanujo kaj Sudslavujo. Konfirmo estas rajtigita en Hungarujo.

---

## La studo pri libereco por sindikatiĝi.

La Internacia Laboroficejo ĵus eldonis la unuan volumon de sia grava studo pri libereco por sindikatiĝi.

La principo de la libereco por sindikatiĝi estas, kiel oni scias, fundamenta en la programo de la Internacia Labora Organizaĵoj. Por sciiĝi pri la praktika apliko de tiu principo, la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo, en Oktobro 1923, laŭ la propono de S-ro Jouhau, Franca laborista reprezentanto, komisiis al la Oficejo, kolekti la plej kompletan dokumentaron pri la situacio de la laboristoj en diversaj landoj rilate la rajton por asociado.

Poste la demando estis enmetita en la tagordon de la deka kunsido de la Konferenco, kaj la enketo farata de la Oficejo kunligiĝis kun la preparo por tiu kunsido.

La kunsido okazis en Junio de ĉi tiu jaro, kaj la Konferenco decidis, ke la demando ne reaperu en la tagordo de la kunsido en 1928. Rezulte de tiu decido, la demando pri internacia garantio de la libereco por sindikatiĝi ne plus estas temo por tuja diskuto en la Konferenco. Tamen la scienca ekzameno de la problemo ne perdis intereson. Tute kontraŭe. Ekzistas tiom da necerteco pri la naturo kaj amplekso de tiu rajto, ke la utileco de la dirita enketo estas kiel eble plej evidenta.

La unua volumo estas dediĉita al la kompara studo de la leĝa situacio de la sindikatoj en diversaj landoj. Kvar aliaj volumoj sekvos, en kiuj troviĝos apartaj monografioj detale montrantaj tiurilatajn leĝarojn en unu kaj alia lando.

---

## La problemo pri loĝejoj.

La Internacia Laboroficejo tuj eldonos la gravan studon, kiun ĝi faris pri la metodoj de statistiko pri loĝigo.

Estas afero, en kiu la plimulto de la Ŝtatoj, sub la premo de la ĝenerala manko de loĝejoj, devis rapide improvizi. Antaŭ la milito la plimulto de la Registaroj konsideris la konstruon kaj administron de domoj kiel apartenaĵon de privata iniciativo. Kiam la naciaj, kaj komunumaj aŭtoritatoj sin trovis devigataj enmiksiĝi en tiu demandoj, ili provis orienti ilian politikon laŭ precizaj informoj. Oni ekvidis tiam, kiel neperfektaj estas la ekzistantaj statistikoj kaj kiel malfacile estas fari per ili utilajn komparojn. Tial la Internacia Laboroficejo, kies studo pri la « Problemo pri loĝejoj en Eŭropo », eldonita antaŭ tri jaroj kaj tuj reeldonota, tiris al si multe da atento, direktiĝis al la esploro de la ebleco unuformigi la statistikojn pri loĝejoj. Tia unuformigo estas nepre necesa, por ke ĉiu lando povu profiti la eksperimentojn faritajn en la ceteraj.

Por sukcesigi tiun laboron, la Oficejo sin dokumentis ĉe la aŭtoritatoj de pluraj grandaj urboj, inter aliaj Amsterdam, Basel, Berlin, Bruxelles, Budapest, Firenze Frankfurt, Hamburg, Haag, London, Lyon, Manchester, München, Oslo, Praha, Stockholm, Warszawa, Züriche. Tamen ĝi ne limigis ĝian studon per la urbaj statistikoj; ĝi ankaŭ atentis la naciajn statistikojn, kiuj lasttempe fariĝis pli kaj pli gravaj. La nova eldonaĵo enhavos la rezultatojn de tiuj esploradoj.

---

## Mono kaj senlaboreco.

Pluraj eldonaĵoj de la Internacia Laboroficejo jam montris, ke unu el la plej gravaj faktoroj pri senlaboreco estas la nekonstanteco de la aĉetpovo de la mono, nekonstanteco kiu montriĝas per la ŝanĝoj de la indekso de la ĝenerala preznivelo. Nova studo verkita de S-ro Fuss, Estro de la Servo pri Senlaboreco en la Internacia Laboroficejo, tute konfirmas la intiman interdependecon ligantan la prezmovojn kaj la situacion en la labormerkato. Kiam la ĝenerala preznivelo malaltiĝas, senlaboreco pliiĝas, kaj inverse. La plej lasttempaj spertoj tiurilataj en la plej diversaj landoj: Usono, Granda Britujo, Germanujo, Aŭstrujo, Hungarujo, Ĉeĥoslovakio kaj Ruslando, pravigas tium kvazaŭan ekonomian leĝon. El la Ŝtatoj, kies mon-

sistemo estis religita al la ornomo, aŭ kiuj, almenaŭ, konservis la konstantecon de ilia valuto rilate al la dolaro, nur Nederlando, Irlando kaj Kanado prezentas escepton el la korespondeco tiel regule konstatata, kaj tio okazas tial, ke aliaj influoj venkis la mono-faktoron. Tamen, kiam oni pasas de la landoj posedantaj konstantan monon al tiuj, kie la kunligo de la monunuo al la ornomo ne estas ankoraŭ restarigita, oni konstatas multe pli klare la rilaton inter la variado de la aĉetpovo kaj tiu de la senlaboreco. Tiel estas, ekzemple, pri Francujo, Italujo, Danujo, Norvegujo kaj Japanujo.

La konkludo de la studo estas, ke mona politiko celanta konstantigi, ne la preznivelon de ĉiu komercaĵo, kiel oni kredas kelkafoje, sed kio estas nek eble nek dezireble, sed la ĝeneralan preznivelon, alivorte, konservi konstantan rilaton inter la produktado kaj la pagiloj necesaj por la interŝanĝo de la produktaĵoj — ke tia politiko forigus unu gravan kaŭzon de senlaboreco.

## Novaj progresoj pri la Okhora Tago.

La ĉiusemajna eldonaĵo de la Internacia Laboroficejo, *Informations sociales (Industrial and Labour Information)* analizas diversajn freŝdatajn dokumentojn pri laborhoroj en diversaj landoj.

En Francujo sep novaj dekretoj estis publikigitaj por reguli la aplikon de la okhora tage en industrioj ne ampleksitaj de antaŭaj regularoj.

En Belgujo nova dekreto fiksis la modojn por apliki la leĝon pri la okhora tago al iuj industrioj kies aktiveco kutime pliiĝas laŭsezone.

En Meksikio regularo efika de la 1-a de Septembro aplikas la okhoran tagon, en ĉiuj komercaj establajoj, al ĉiuj personoj okupataj kiel komizoj, laboristoj kaj helpantoj.

En Usono la akcepto de la okhora labortago en la tuta ferindustrio estas definitiva fakto. « Estas sendube », diras la « Iron Trade Review », ke ĝia apliko rezultigis malpliiĝon de nekonstanteco en la laboristaro kaj pliiĝon de laborprodukto. Aliflanke la prezoj de fero kaj ŝtalo tendencas fali.

En Argentino, respondante al demandaro sendita al ĝi de la Komisiono por redakto de Kodo pri Laboro, la Laborasocio *(Asociación del Trabajo)*, organizaĵo de mastroj, deklaris: « Ni konsentas ĝenerale la aplikon de la okhora labortage kaj ni akceptas la teoriajn motivojn, jurajn kaj sociajn, pravigantajn la enmiksiĝon de la Ŝtato en la reguligo de la laboro, kiel ankaŭ la sciencajn, ekonomiajn kaj moralajn argumentojn, montrantajn ke tiu limigo de la labordaŭro estas la plej konvena. » Tamen la Asocio plue diris, ke ĝi ne povas rekomendi la konfirmon de la Washingtona Konvencio ĝis la grandaj industriaj Ŝtatoj ĝin konfirmos.

## Industrio, produkto kaj kostoj en Ruslando.

Lasttempaj Rusaj dokumentoj, analizitaj en *Informations sociales (Industrial and Labour Information)*, la ĉiusemajna eldonaĵo de la Internacia Laboroficejo, informas pri la nuna situacio de la Ŝtatindustrio de la U. R. S. S. (Unuiĝo de Respublikoj Sovetaj Socialistaj). Ĉi tiu industrio okupas pli ol du milionojn da laboristoj. Dum dekok monatoj, de la 1-a de Oktobro 1925 al la 1-a de Aprilo 1927, la nombro de laboristoj okupataj pliiĝis je 9 procentoj, la meza produkto por ĉiu laboristo pliiĝis je 20 procentoj kaj la nominalaj salajroj je 15 procentoj. Dum la sama periodo la vivkosto pliiĝis je 10 procentoj, kio malpliiĝis la realan valoron de la pliiĝo de la salajroj je du trionoj.

La produktado alproksimiĝas al la antaŭmilita nivelo en la teksa kaj petrola industrioj; ĝi iomete superis tiun nivelon en la karbindustrio. Kontraŭe la metala industrio donas apenaŭ pli ol 50 procentojn de la produktaĵo de 1913.

Malgraŭ la ĝenerala pliiĝo atingita, la Ŝtatindustrio devas intensigi ankoraŭ sian produktadon, por plenumi la kreskantajn bezonojn de la loĝantaro. La Prezidanto de la Supera Konsilantaro pri Nacia Ekonomio deklaris tiu-rilate: « La granda problemo, la fundamenta problemo por la U. R. S. S. estas la industrialigo de la lando. Tio dependas tute, kaj pli kaj pli dependos de la malpliiĝo de la kostoj. »

Laŭ la opinio de la oficistoj direktantaj la Ŝtatindustrion, la tro alta kosto de la produktado rezultas el la jenaj kaŭzoj: kareco kaj malbona kvalito de krudaj materialoj; kareco de materialoj por konstruado; prezaroj de la fervojoj kaj diversaj tro altaj impostoj; relative alta kosto de laboro.

La Konsilistaro de Laboro kaj Defendo, en la rezolucio akceptita pri tio, deklaras, ke la Supera Konsilistaro pri Nacia Ekonomio devas, laŭ la mezuro kiel progresas la teknika plibonigo de la industria ilaro, zorgi por ke la proporcio de laborkostoj en la tuta kosto malpliiĝu. « La Konsilantaro devas plibonigi la organizon de laboro en la establajoj; ĝi devas interalie konduki la nombron da laboristoj al la nivelo postulata de la bezonoj kaj la programo de produkto; ĝi devas plivastigi la normon de produko por ĉiu laboristo proporcie al la plibonigoj faritaj pri organizo kaj racionaligo. »

## Novaj ciferoj montras la gravecon de la perdoj kaŭzataj de laborakcidentoj.

Oni scias, ke la Internacia Labora Konferenco diskutos, en sia sekvonta kunsido, la demandon pri la antaŭforigo de laborakcidentoj. La urĝeco de ĉi tiu problemo fariĝas pli kaj pli evidenta kun la progreso de la preparaj studoj.

La spertuloj, kunvenintaj, je la komenco de ĉiu tiu monato en la Subkomitato pri Sendanĝereco ĉe la Internacia Laboroficiejo, raportis frapantajn ciferojn pri la perdoj kaj malutiloj ĉiuspecaj kaŭzataj ĉiutage de laborakcidentoj. Aliaj ciferoj poste publikigitaj en *Informations sociales (Industrial and Labour Information)* eĉ pli forte montras la gravecon de la malbonaĵo.

En Germanujo, en 1925, la oficialaj raportoj anoncis 5,285 mortigajn laborakcidentojn kaj 50,768 akcidentojn rezultigantajn daŭran nekapablecon por laboro, aŭ partan aŭ tutan. La nombro da laborinvalidoj ricevantaj kompenson estis 428,421. En 1926, la sumo pagita por kompenso estis 260 milionoj da markoj.

En Granda Britujo, en 1926, oni raportis 139,963 akcidentojn, el kiuj 806 mortigaj, en ĉiuj industrioj krom la minejoj. En la minejoj, la nombro da akcidentoj en 1925 estis 189,223.

En Italujo, en 1923, la kompensoj difinitaj okaze de 357,322 akcidentoj, el kiuj 1,253 mortigaj kaj 25,084 kaŭzintaj daŭran nekapablecon, atingis 168,903,000 lirojn.

En Usono, en 1924, oni raportis 21,232 mortigajn kaj 2,324,829 nemortigajn akcidentojn. En 1926, ĉe nur 687 establajoj, la nombro de labortagoj perditaj rezulte de laborakcidentoj estis 3,012,757.

## La efiko sur produktado de la Okhora Leĝo en Francujo.

La ĉiusemajna eldonaĵo de la Internacia Laboroficejo, *Industrial and Labour Information (Informations sociales)*, resumas raportojn de la Franca Ministerio de Laboro pri la efiko de la Okhora Leĝo sur produktado.

Ĉi tiuj raportoj rilatas al granda nombro da industrioj inter aliaj ŝpinado kaj teksado de kotono, fabrikado de kaŭĉuko kaj vakstolo, fandejoj, fabrikado de metalfadeno kaj najloj, de papero, kartono kaj porcelano, segejoj, brikejoj kaj tegolejoj, k. t. p.

En ĉiuj okazoj la esploro montris ke, post kelkatempa malpliiĝo tuj sekvinta la enkondukon de la okhora labortago, produktado rapide reatingis la plifruan nivelon, dum en iuj industrioj, la Okhora Leĝo stimulis klopodojn por reorganizo rezultiginta pli grandan produktadon ol sub la dekhora sistemo. Tiu rezultado ĝenerale devenis de la enkonduko de pli moderna maŝinaro, plibonigo de ekzistanta ilaro kaj pli efika utiligo de la teknikaj kapabloj de la laboristoj.

La aluditaj raportoj estas bazitaj sur sciigoj kolektitaj de laborinspektoroj eventuale kompletigitaj kaj korektitaj de la koncernataj firmoj, kiuj aprobis la eldonon de la raportoj.

Aldono ce " ESPERANTO "
Februaro 1928

# INVITO


je partopreno al la

# KOMERCAJ ESPERANTO-TAGOJ

# ĈE LA FOIRO DE LYON

la 17-18 marto 1928








## *Programo*

1. Karavana vojaĝo. Elirpunkto : Genève ;
   Foriro Genève, Sabaton, 17 Marto 1928, je 7.15 h. ;
   Alveno Lyon, Sabaton, 17 Marto 1928, je 10.10 h.
2. Unuopa vojaĝo de partoprenantoj el diversaj landoj kaj renkontiĝo en Lyon.

### EN LYON

*Sabaton, 17 Marto :* 12 h. Tagmanĝo en la hoteloj.
14.30 h. Ekveturado per aŭtomobiloj de la hoteloj al la Foira Palaco.
15 h. Alveno ĉe la Foira Palaco. Saluta Alparolo per la Foira Direkcio en la « Atrium » de la Palaco.
de la 15 — 17 h. Vizito de la Palaco sub la gvidado de la Estro de la Esperanto-Fako de la Foiro.
17 h. Akcepto en la Foira restoracio per la Foira Estraro. — Interŝanĝo de salutparoloj.
19 h. Komuna vespermanĝo kun la Lyona Esperantistaro.
20.30 h. Amika kunveno kun la Lyona Esperantistaro.

*Dimanĉon, 18 Marto :* Dum la mateno. Individua vizito de la Foiro kaj laŭvola negocado.
12 h. Tagmanĝo en la hoteloj.
15 h. Ekveturo per aŭtomobiloj por rondveturado tra la urbo : Parko « Tête d'Or », Monteto « Fourvière », Katedralo de St. Johano k. t. p.
18 h. Vespermanĝo en la hoteloj.
19.28 h. Foriro de la vagonaro al Genève.
0.35 h. Alveno en Genève.

La Turisma Servo de UEA aranĝas specialan karavanon de Ĝenevo al Lyon por vizitontoj de la Foiro kaj alvokas al ĉiuj esperanto-komercistoj kaj interesitoj por partopreno en tia unika aranĝo. Ĝi donas bonegan propagand-okazon por nia afero. Neniu preterlasu tiun ĉi unikan eblecon. Povas partopreni ĉiuj personoj, kiuj interesiĝas pri la Foiro de Lyon

*Tuj sendu vian aliĝilon al Turisma Servo de UEA, 12, Boulevard du Théâtre, Genève.*

Universala Esperanto-Asocio

Turisma servo

# ALIĜILO

*La subskribinto partoprenas en la aranĝo de la Komercaj Esperanto-Tagoj ĉe la Foiro de Lyon la 17-18 marto 1928.*

1. Mi mendas :

   ..... ĉambro(j)n kun ..... lito(j) por .... noktoj por la prezo de svis. frk. 6.— po nokto (*).

   svis. frk. 7.50 po nokto (*).

2. Mi partoprenas en la karavano Genève-Lyon, alvenonte en Genève la .....

   Mi petas rezervi por mi

   ..... lokojn de II-a klaso en la vagonaro Genève-Lyon.

3. Mi vojaĝas rekte al Lyon kaj petas vin, komuniki al mi la nomon de mia hotelo mendita supre.

   Mi sendas al vi ĉi-kune per poŝtmandato, al via poŝtĉeka konto *kiel antaŭpagon.*

   por la hotelo svis. frk. 10.— (aŭ egalvaloron) (*)

   por la bileto svis. frk. 10.— (aŭ egalvaloron) (*)

(*) Forstreku tion, kio ne taŭgas.

*Subskribo :* ..................................................

*Familia nomo :* ..................................................

*Antaŭnomo :* ..................................................

*Profesio :* ..................................................

*Strato (nacilingve):* ..................................................

*Urbo :* .............................. *Lando :* ..............................

**Poŝtĉekkontoj :**

Poŝtĉekkonto 79236 Praha — Poŝtĉekkonto 90850 Frankfurt am Main — Poŝtĉekkonto 190576 Warszawa — Poŝtĉekkonto Genève I. 2310 — Conti Correnti Postali Milano 3-327

Poŝta Ŝparkaso Wien: konto 105439 — Compte de chèques postaux Lyon 221 76 — Compte de chèques postaux Bruxelles 184200 — Poŝtĉekkonto S. H. S. Zagreb: 40759 — Postgiro Stockholm Konto: 4138

## UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

(Turisma Servo)

**Centra Oficejo : 12, Boulevard du Théâtre, Genève (Svislando)**

Presejo de Belga Esperanto-Instituto, K.S. — ANTVERPENO.